**PILO-PRESS**
Internacia
Informservo

Ĉu vi jam pagis
vian abonkotizon
por 1976?

30,-- GM

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 463649; 514269

N-ro 11/1976 - 11 marto 1976
Aperas ĉiusemajne

## Eŭropa Esperanto Kongreso
## Pliaj germanaj membroj al la Honora Komitato

Düsseldorf/Bonn (pp) - Du pliaj germanaj politikistoj deklaris sin pretaj aliĝi al la Honora Komitato de la Eŭropa Esperanto Kongreso, nome:

Jürgen Girgensohn, Düsseldorf, kulturministro de la federacia lando Nordrhein-Westfalen

Prof. D-ro Fritz Burgbacher, Bonn-Köln, membro de la germana parlamento "Bundestag" kaj de la Eŭropa Parlamento.

## Eksperimenta instruado de Esperanto

Balge (pp) - Laŭ informo de la sekcio Malsupra Saksujo de la Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj nuntempe funkcias la eksperimenta instruado "Esperanto en la elementa lernejo". En Malsupra Saksujo partoprenas tri lernejoj, nome Dollbergen, Fröbelschule Peine kaj Balge.

Krome partoprenas lernejoj en jenaj landoj:

Belgio: Saint Gerary

Francio: Hennebont, Le Mans kaj Sainte Colombe

Greklando: Ateno (2 Klasoj)

Nederlando: Waalwyk, Soest kaj Wormer.

Entute lernas Esperanton en la kadro de tiu eksperimento 336 infanoj. Intertempe ili atingis la 12-an lecionon de la lernolibro de Korte "Sub la verda standardo".

En Paderborn kaj ĉirkaŭaĵo Esperanto nuntempe instruata en 23 lernejaj klasoj. En Bad Lippspringe ĉi-monate komenciĝis la Esperanto-instruado por 70 infanoj de la 3-a lernojaro.

## Membrokunveno en Balge

Balge (pp) - AGEI, landa sekcio Malsupra Saksujo, invitas siajn membrojn al kunveno por dimanĉo, la 21-a de marto 1976. Informojn donas Günther Peek, 3071 Balge 60, telef. 04257-213.

## AGEI-kunveno en Eindhoven

Paderborn (pp) - La membrokunveno de la Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj (AGEI) okazos kadre de la Eŭropa Esperanto Kongreso en Eindhoven, la 17-an kaj 18-an de aprilo 1976.

## Kontraŭ-rasisma jardeko

La ILEI-konferenco somere 1975 instigis siajn membrojn entrepreni paŝojn por ke la lernejoj partoprenu en la kontraŭ-rasisma kampanjo de UNESKO sub la devizo: "Ne rasoj, sed ni vivas en la mondo."

Pri la 61-a Universala Kongreso de Esperanto

Ateno/Pécs (pp) - S-ino Flora Szabó-Felsö, estraranino pri kongresoj kaj konferencoj de UEA sendis la sekvantan artikolon pri la 61-a Universala Kongreso de Esperanto, okazonta en Ateno de la 31-a de julio ĝis la 7-a de aŭgusto ĉi-jare:

"Proksimiĝante al la malfermo de la 61-a Universala Kongreso, en Greklando de tago al tago kreskas la interesiĝo eĉ en ekstermovadaj rondoj. Aperis pluraj artikoloj pri Esperanto, komenciĝis kelkaj kursoj. La ministerio de civilizo kaj la urbo Ateno esprimis la deziron akcepte regali reprezentantojn de la kongreso. Laŭ la urbestro, s-ro Papatheodoru, Ateno dum la UK estos speciale lumigata.

La ĉi-jara plej granda manifestiĝo de la Internacia Lingvo okazos sub tre favoraj cirkonstancoj. La kongresejo, altlernejo Pantios troviĝas en la proksimeco de la urbocentra placo Sintagma. La Inaŭguro kaj Malfermo okazos en la ĉefa salono de impona hotelo Hilton.

La ĉeftemo de la UK estos: "Internacia kunlaboro de ŝtatoj je regiona nivelo". Krome estas decidata aparta interna ĉeftemo: "Kiel nuntempe argumenti por Esperanto?" Ĝi celas veki diskuton pri la plej bonaj manieroj adapti la informadon pri la Internacia Lingvo al la ŝanĝiĝintaj mondaj cirkonstancoj kaj al modernaj pensmanieroj. La kongresa programo enhavas i.a. aron da diversaj kunvenoj, prelegojn de Internacia Somera Universitato, kulturajn kaj amuzajn aranĝojn. Dum la semajno okazas duontagaj ekskursoj tra Ateno kaj al kabo Sunion. Tuttagaj ekskursoj celos al Delfi aŭ Argolis kaj per ŝipo al la pli proksimaj insuloj.

La meza atmosfera temperaturo en Ateno en la kongresa periodo estas ĉ. 28° C. La varmo ne ĝenos la kongreson, ja la kunvenoj okazos en klimatizitaj salonoj kaj la programoj evitas la tagmezajn horojn.

La hotelkostoj laŭ la fiksitaj prezoj varias de 9 ĝis 10 US-dolaroj en dupersona ĉambro en la kategorio C, ĝis 42 US-dolaroj en la kategorio de luksaj hoteloj. Ĉiuj hotelprezoj - escepte de la plej luksa kategorio - inkluzivas ne nur matenmanĝon sed ankaŭ unu alian manĝon, tagmanĝon aŭ vespermanĝon, laŭ propra elekto por ĉiu aparta tago. Do la hotelprezoj efektive estas malpli altaj ol en la lastaj kongresurboj. Krom la menditaj hoteloj LKK rezervis 300 lokojn en tre komforta studenta domo kun unulitaj ĉambroj.

Aliĝilon por la 61-a Universala Kongreso de Esperanto oni povas peti de la landaj perantoj aŭ rekte de la Centra Oficejo, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 3002, Nederlando."

Pri la Esperanto-Centro Dr. Zamenhof

Hamburgo (pp/hŝ) - La Societo "Esperanto-Centro D-ro Zamenhof", domo por internaciaj renkontiĝoj nun estas je la sojlo de sia dua periodo. Tion emfazis d-ro Werner Bormann en intervjuo kun Harald Schicke pri tiu grava esperantista entrepreno.

D-ro Bormann esperas, ke jam en 1978 la esperantistoj el tuta mondo povos ferii la unuan fojon en tiu centro. Al tiaj esperoj instigas d-ron Bormann la fakto, ke jam en la unua periodo de sia ekzisto, kiam apenaŭ ia informa laboro estis farita, relative multaj esperantistoj fariĝis akciuloj, tiel ke jam pli ol DM 40 000 estas je dispono de la societo.

Tiu societo ja celas aĉeti domon proksime de la metropolo Hamburgo, por grave akceli la Esperanto-vivon en FR Germanujo. En tiu domo instaliĝos kultura centro, kiu estos malferma por ĉiuj esperantistoj.

En la nuna dua periodo la societo lanĉas vastskalan varbkampanjon por vendi tiom da akcioj, ke la domaĉeto baldaŭ povos okazi. La societo jam estas en seriozaj intertraktoj pri unu interesa objekto.

Ĉiu, kiu opinias, ke tia centro nepre devas ekzisti en FR Germanujo, petu detalajn informojn pri la societo de:

> Esperanto-Centro D-ro Zamenhof, S-ro Sudec, Wandsbeker Chaussee 155, D-2000 Hamburg 76.

Esperanto en la Radio

Varsovio. La kadra programo de tiu stacio antaŭvidas en ĉiu elsendo aŭ radian ĵurnalon, komentarion, kulturan, ekonomian felietonon aŭ komentarion, diverstemajn felietonojn ktp. Pro tio, laŭ la opinio de la Esperanto-Redakcio, la leterkesto ne povas esti plilongigata al duona horo. Kelkaj aŭskultantoj proponis tian plilongigon konsidere de la multaj envenantaj leteroj. En la semajno de la 4-a ĝis la 10-a de marto eniris ĉe la redakcio de Pola Radio 117 korespondaĵoj de esperantistoj. Tia nombro kompreneble kaŭzas problemojn, la redakcianoj, kiuj ja ne estas multnombraj, devas legi, prijuĝi, elekti kaj prezenti ilin en la leterkesto. Individua skriba respondo verŝajne tute ne plu eblas.

Interese estas ke en la pintaj lokoj de la semajna statistiko okazas regule ŝanĝoj. Do, ne plu estas tiel, kiel en la pasinta jaro, ke unu persono preskaŭ dum la tuta jaro tenis la unuan lokon.

En la Esperanto-Ekspreso dimanĉa oni povis denove aŭdi intervjuon kun la sveda instruisto Olle Olsson el Lund. I.a. li menciis, ke ILEI volas krei Regionon III (Skandinavio) por eksperimenta instruado de Esperanto.

Svisa Kurtonda Servo. D-ro Arthur Baur daŭrigis sian serion pri la reto-romanĉa lingvo, kaj ges-roj A. kaj Cl. Gacond prelegis denove pri la instruado de Esperanto en komparo kun la franca lingvo.

Radio Romo informas pri ŝanĝo en la respondeco de la programo. Antonio De Salvo en cirkulero sciigas: " Gajninte kiel Referanto (juĝisto) ĉe la Itala Konto-Kortumo (la Supera Kontrola kaj Justica Instanco, kiu kompetentas pri publikaj spezoj), mi provizore translokiĝis de Romo al Venecio (mi esperas reveni al Romo venontjare). Intertempe, d-ro Renato Corsetti, kiu jam pli frue prizorgis la Esperanto-elsendojn de Radio Roma, grandanime akceptis transpreni la respondecon de la programo. Mi daŭre redaktos la tekstojn, kaj laŭeble prizorgos la korespondadon. Ĝis reaŭdo!"

Cetere la ondolongoj de Radio Roma estas: 30,90 m (9 710 khc), 41,24 m (7 275 khc), 50,08 m (5 990 khc).

Radio Vieno ORF. El la semajna komentario de d-ro Alfred Macher ni citas: "Jen la okulfrapa titollinio de aŭstra gazeto: 'Malboniĝo de la klimato en Aŭstrio'. Dank' al Dio, ne temas pri meteorologia katastrofo, sed nur pri metaforo, nome pri la politika klimato. Tamen, kia troigo! Certe, ekde la jaro 1966 Aŭstrio ne plu estas regata de koalicio kiel dum la 21 antaŭaj jaroj, sed de unu-partiaj registaroj - tre pozitive por la ŝtata bonfarto -, tamen nun okazis nenio alia ol ioma pliakriĝo de la interpartia debata tono. Opoziciestro d-ro Josef Taus rimarkis, ke la registaro diktatorece eluzas sian etan parlamentan plimulton, kaj kanceliero Bruno Kreisky respondis, ke tia akuzo pro diktatorecaj tendencoj estas ŝerco, por socialistoj ne plu tolerebla. Se tia okazaĵeto signifas malboniĝon de la klimato, ni vere estas feliĉaj en nia lando! Sed ĉio estas relativa!"


DEUTSCHE
ESPERANTO-AUSSTELLUNG
AUGSBURG 1976
Eröffnungsfeier
am Samstag,
dem 24. April
um 11 Uhr
Kulturelle
Veranstaltung
im Augustanahaus
Annahof 4
um 19 Uhr
täglich
von
10 – 18 Uhr
jederzeit
Probelektionen
im
RATHAUS
24. April
– 9. Mai 1976